

Eŭropa Bulteno

Julio-Augusto 2017, Numero 172

ENKONDUKE

Karaj gelegantoj,
ĝuste en la tagoj de redaktfino de tiu ĉi bulteno mi subite fortege malsaniĝis pro pulmonito kun sepso. Oni metis min en induktitan komaton, do mi estis senkonsciigita dum la kuracado. Post sep tagoj mi revekiĝis kaj mi restis en hospitaloj pliajn du semajnojn kaj intertempe perdis ne nur multajn kilogramojn sed aparte la forton de muskoloj, tiel ke mi nun relernadas marŝi kaj skribi. Jen la kaŭzo ke la bulteno malfruas. Kun helpo de Maja ni tamen daŭrigas nian laboron kaj plenumas niajn taskojn laŭ aktualaj ebloj.

Zlatko Tišljar

EEU-AKTIVADO EN FREIBURG



ZAMENHOF KIEL INSPIRO DE LA NUNA LINGVOPOLITIKO DE SLOVAKIO PRELEGO KADRE DE KONFERENCO DE EEU EN FREIBURG

Jozef Reinart, Membro de Slovacia Esperanto Federacio kaj Nacia Konvencio pri EU en Slovakio, senjora diplomato de la Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio prelegis dum la komuna konferenco de EEU kaj GEA la 3-an de junio 2017 en Feiburgo honore al D-ro L. Zamenhof pri la temo „Zamenhof kiel inspiro de la nuna lingvo-politiko de Slovakio“.

1) Kontribuo de Slovakio al „Zamenhofa jaro“

Slovakio en 2014, kiam ĝi prezidis en la Viŝegrada grupo (V4, t. e. CZ, HU, PL, SK) subtenis la peton de Pollando ĉe UNESCO por listigi d-ron Ludovik Zamenhof sur la liston de mondaj personecoj en 2017 por honorigi lin kaj prezenti al la mondo okaze de la 100-jara datreveno de lia morto.

„Zamenhofa jaro“ estis lanĉita en Slovakio la 15-an de decembro 2016 en la Pola Instituto en Bratislavo. Dum la jaro okazis/os en Slovakio kelkaj solenaj eventoj kaj pri li kaj Esperanto kaj la publiko estis/os diversforme informita. Zamenhof inspiris esperantistojn de Slovakio jam en 1998 al lingvo-politika ekstermovada agado t. e. antaŭenigi lian genian verkon kaj Esperanton pere de kunlaboro en „Domo de Eŭropo“ en Bratislavo kaj ekde 2004 en kadre de „Nacia Konvencio pri EU“, tutsocia diskutplatformo pri EU, inter alie ankaŭ pri lingvaj kaj kulturaj problemoj kaj serĉado de iliaj solvoj.

Esperantistoj en Slovakio ekstermovade aktivis antaŭ ol estis aprobita „Strategia laborplano de UEA“, dum la UK en Rejkjaviko en 2013, en kiu estis rekomendita malfermiĝo de nia movado al la mondo:

- kontribui al konstruado de daŭripova mondo, multkultura kaj multetna socio
- agi ekstermovade, serĉi aliancantojn por kunlaboro
- Esperanto movado estas natura aliancano por aliaj movadoj por daŭripova mondo, kiun karakterizas: paco kaj justeco; demokratio; daŭripova disvolvado; konservado de naturaj sistemoj.
- ŝlosila problemo de la daŭripova mondo, kiu estas multflanka koncepto, estas kultura evoluigo

2) Ekstermovada lingvo-politika agado en Slovakio

„Nacia Konvencio pri EU“, Tutsocia diskutplatformo laboris en periodo 2004 – 2007 en 11 laborgrupoj (LG-j), kiuj preparadis por la registaro de Slovakio rekomendojn al temoj diskutitaj en EU. Unu el la LG-j estis „LG pri lingva politiko“, kiun mi kunestris, en kiu aktivis ankaŭ kelkaj esperantistoj. LG pri lingva politiko dum du jaroj 2005 – 2006 preparis la studon „Elirpunktoj por lingvo-politika strategio de Slovakio, kiel membro-ŝtato de EU“ kiu havas du partojn: 1) interna lingva politiko, 2) ekstera lingva politiko.

En novembro 2006 LG organizis konferencon de la Viŝegradaj landoj (V4) pri la temo „Perspektivoj de lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en EU“ sub aŭspicio de Dušan Čaplovič, vicĉefministro de Slovakio por eŭropaj aferoj, homaj rajtoj kaj minoritatoj. Dušan Čaplovič, vicĉefministro de Slovakio, dissendis en marto 2007 sian leteron kun konkludoj de la konferenco al ĉiuj komisionanoj de EU, ministroj de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de la membro-ŝtatoj kaj kandidato-ŝtatoj de EU, en kiu li invitis ilin al tuteŭropa diskuto pri serĉado de solvoj de lingvaj problemoj en EU.

Post 6 jaroj estis „Nacia Konvencio pri EU“ renovigita la 9-an de majo 2013. Tiu ĉi tutsocia diskutplatformo eklaboris en tri LG-j, kiuj preparadis rekomendojn por la registaro de Slovakio al diskutitaj temoj pri EU kaj eŭropa integriĝo: 1) Aktualaj defioj de la eŭropa integriĝo, 2) Dek jaroj de la membreco de SK en EU 3) Prezidanteco de Slovakio en la EU-Konsilio en 2016. Ni, 4 esperantistoj, aktivaj en la 1-a kaj 3-a LG-j rekomendis en la temon „Evoluo de kultura dimensio en EU: komuna lingva kaj kultura politiko“ por la prezidanteco de Slovakio (SK PRES) en la Konsilio de EU, kiel unu de temoj de nia prezidanteco. Bedaŭrinde niaj ŝtataj kaj politikaj reprezentantoj ankoraŭ ne kompreni/as gravecon de la evoluo de kultura dimensio en la EU kaj por sukcesa daŭrigo de la eŭropa integriĝo. Ili ne kuraĝis listigi tiun ĉi politike tiklan temon inter prioritatoj de la SK PRES. Ili preferis prioritati 4 temojn (t. e. ekonomie forta EU; komuna cifereca merkato kaj energia unio; daŭripova migrada kaj azila politiko; forta pozicio en la tutmondiĝanta mondo) + la 5-a prioritato fariĝis neplanite „Briteliro“.

Aliaj membroj de NK akcentis en diskuto kaj raporto jenajn defiojn por la eŭropa integriĝo, kiel ekzemple: civitanoj - ilia engaĝiĝo en la eŭropan integriĝon; kreo de eŭropa publiko, tuteŭropa diskuto, eliminado de paradoksoj, kontraŭdiroj ka obstakloj en EU; unuigado de Eŭropo - ĝia federaciigo. Aliaj membroj de NK menciis la defiojn kaj rekomendojn, sed ne scias kiel efektiviĝi ilin. Ni, esperantistoj, proponas ilon (Esperanton), kiu povus grave helpi akiri akcepteblajn respondojn al la defioj.

Bedaŭrinde Slovakio estas sola en EU, kiu havas la tutsocian diskutplatformon pri EU. Tiaj formaj diskutplatformoj ebligas al ni oficiale partopreni en diskutoj pri temoj/problemoj de EU kaj trovi aliancinojn. Tio estas niaj ŝancoj atentigi partnerojn pri bezono diskuti ankaŭ pri lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU kaj serĉado de egalarajtaj solvoj – levi ilin iner EU prioritatoj.

Ni, esperantistoj en EU membro-ŝtatoj (MŜ-j), havas pere de diskutforumoj:

- ŝancojn kaj devojn helpi sentabuigi lingvajn kaj kulturajn problemojn en EU,
- iniciati tuteŭropan diskuton pri serĉado de optimala lingva komunikado de ĉiuj civitanoj de EU,
- temas pri ni ĉiuj,
- niaj lingvoj kaj kulturoj,
- nia pozicio kaj respekto en la multlingva kaj multkultura eŭropa komunumo.

Eblas fari jenajn konkludojn:

- solvado de lingvaj kaj kulturaj problemoj de EU estas urĝa,
- estas bezonate malfermi pri ili tuteŭropan diskuton,
- serĉi solvojn por civitanoj,
- objektivite konsideri eblecojn de solvado de lingvaj kaj kulturaj problemoj,
- prepari sciencajn studojn pri eblaj solvoj, inkluzive de neŭtralaj, kiel EO,
- prepari eksperimentojn en pluraj landoj,

- taksi iliajn rezultojn,
- surbaze de ili fari politikan decidon pri optimala solvo de lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU por vasta apliko.

3) Pliaj formoj de la ekstermovada agado

En 2009 Eŭropa Komisiono estis kreita „Eŭropa Civitana Socia Platformo por Multlingvismo“ (ECSPM), (29 NROj – inter ili EEU kaj Edukado@Interreto) en 2009 – aktive kaj sukcese agadis/as je eŭropa nivelo.

„Ekonomia Forumo en Krynica (PL)“, (t. n. „Davos en Oriento“ ĉirkaŭ 2500 partoprenantoj kaj 500 ĵurnalistoj el la mondo), kiu okazas ĉiujare en septembro estas plia grava ekstermovada agado de EEU kaj E@I en 2005 – 2015 (kie ni havis standon kaj diskutpanelon), kiun organizis EEU/E@I, finance subtenis UEA, ESF kaj aliaj fondaĵoj. Post 2-jara paŭzo EEU ni volus reveni al tiu ĉi monda forumo.

4) 101-a UK en Nitro 2016

Tiu malfermis nian movadon al la mondo pere de 3 malfermitaj fakaj aranĝoj:

- 20-a Internacia Medicina Esperanta Kongreso (la 20 – 22-an de julio 2016)
- Mezeŭropa interreligia forumo (la 25-an de julio 2016)
- Lingvo-politika konferenco de la landoj V4+ „Perspektivoj de lingva komunikado en EU“ (la 28 – 29-an de julio 2016)

Lingvo-politika konferenco de la landoj V4+ „Perspektivo de lingva komunikado en EU“

- V4+ landoj (ĈR,HU,PL,SK + samopiniantaj landoj de EU),
- okazis sub aŭspicio de Miroslav Lajčák, Ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio,
- aranĝo de la Prezidenteco de Slovakio (SK PRES) en la Konsilio de la EU de neregistaraj organizoj (NROj), kiun partoprenis politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj.

Ĉefparolantoj de la konferenco estis:

Vytenis Andriukaitis (LT), EU-komisiano por sansistemo kaj Nutraĵsekuro (2014 -), kiu prezentis sian tre pozitivan poreŭropan paroladon, kiel unua EU-komisionano en Esperanto. Ján Figel' (SK), eksa EU-Komisiano por Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo (2004 - 2009), aktuale speciala ambasadoro de EU por religia libereco en la mondo (2016-) sendis al partoprenantoj sian subtenan salutmesaĝon.

Partoprenantoj de la konferenco aprobis Nitran Deklaron kaj dokumentojn al 3 ĉeftemoj: 1) Civitana engaĝiĝo, 2) Multlingvismo en ekonomio kaj socio, 3) Eduka inkludo. Nitra Deklaro skizas fundamentajn problemojn de la ĝisnuna eŭropa integriĝo:

- krizo de identeco en la EU - „Briteliro“ klare montris, ke la nuna krizo de la eŭropa integriĝo,
- regi diversecon - estas la ŝlosila afero kaj ĝia akordigo estas ekzista problemo por la EU,
- civitana engaĝiĝo - restos malforta ĝis la civitanoj eksentos eŭropan identecon en harmonio kun siaj identecoj nacia kaj regiona,
- EU-moto „Unuigitaj en diverseco“ ne estas ekvilibrata, favoras en ĝi diverseco je la kosto de unueco,
- krei komunan edukan sistemon por eŭropaj civitanoj - ĝis nun EU evitas ajnan provon,
- ne ekzistas komuna lingvo, kiu esprimus la tuteŭropan identecon,

- lingva malegaleco - estas ofte la rezulto de malprudentaj lingvaj politikoj kaj ne la rezulto de spontaneaj soci-ekonomiaj fenomenoj.
- lingva maljusto - kreas diversajn formojn de ekonomia kaj socia diskriminacio, kiu povas esti traktata en la EU per taŭga lingvo-politiko,
- tendenco subtaksi la gravecon de lingvopolitiko, kiel faktoron de integriĝo ekzistas ĝeneraliĝinta,
- fremdlingva instruado ne alportas la atenditajn rezultojn!
- prepari novan strategion por plibonigi la instruadon de fremdaj lingvoj, levante konscion pri lingvaj kaj interkulturaj kapabloj,
- empiriaj enketoj al lernado de fremdaj lingvoj - devas esti organizitaj por stimuli plian lernadon de alia(j) lingvo(j),
- praktikaj paŝoj al lingva diverseco kaj komuna eŭropa identeco.

Partoprenantoj de la konferenco (politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj) diskutis pri tri temoj:

- Civitana engaĝiĝo - rimedoj por certigi, ke registaroj kaj EU-institucioj disponigadu informojn pri siaj aktivecoj kaj programoj en larĝa gamo de eŭropaj lingvoj, kaj ke aliro al la institucioj ne privilegiu nur unu aŭ du lingvojn.
- Multlingvismo en ekonomio kaj socio - eviti socian ekskludon kaj plifortigi la internan merkaton.
- Eduka inkludo – mezuroj por: a) instigi lernadon kaj uzon de algrandaj/najbaraj lingvoj; b) subteni hejmajn lingvojn de lernantoj, c) ligi lingvo-lernadon pli forte al la evoluo de eŭropa identeco kaj solidareco.

Daŭrigo de la konferenco kaj efektiviĝo de rekomendoj okazis/as en jenaj formoj:

- Fakultato de Mezeŭropaj Studoj (FMS) de UKF en Nitro dissendis al ĉiuj partoprenantoj aprobitajn dokumentojn (en la slovaka, Esperanto, angla) por ilia utiligo kaj formala/neformala disvastigo.
- FMS preparis almanakon de prelegoj de la konferenco.
- Finaj dokumentoj estas rete legeblaj sur hejmpaĝoj de E@I.
- Estas propono, ke Miroslav Lajčák, Ministro de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio, aŭspicianto de la konferenco – dissendu sian leteron kun aprobitaj dokumentoj al ĉiuj EU-komisionanoj kaj ministroj de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de 27 membraj ŝtatoj de EU (simile kiel dissendis sian leteron Dušan Čaplovič, Vic-Ĉefministro de Slovakio por eŭropaj aferoj, en marto 2007).
- surbaze de pozitivaj respondoj ni povus prepari esplorprojektojn kaj pliajn aktivecojn.
- Ľuboš Blaha, Prezidanto de Parlamenta Komitato por Eŭropaj Aferoj de Slovakio, dissendis en 12/2016 sian leteron kun aprobitaj dokumentoj al siaj partneroj por iniciati parlamentan diskuton dum la SK PRES en EU-Konsilio pri lingvaj problemoj en EU, enkadre de la diskuto pri estonteco de EU/Eŭropo.
- Rekomenditaj estis similaj formalaj aŭ neformalaj agadoj en la landoj V4+ kaj MŜ kaj KŜ de EU dissendi konkludojn de Nitro, kiujn ebligis lanĉi diskuton pri lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU.
- Ni klopodas kunlabore kun naciaj delegacioj de Slovakio en la Eŭropa Ekonomia kaj Socia Komitato (EESK) kaj la Komitato de Regionoj (KdR) de EU pri dissendo de komunajn leterojn kun konkludaj dokumentoj de Nitro al ĉiuj 27 landaj delegacioj, kiel ilia kontribuo al diskuto pri estonteco de Eŭropo kaj tiamaniere atentigi en EU pri bezono diskuti ankaŭ pri la lingvo-politika problemaro kaj levi lingvaj demandoj kaj problemoj en EU inter ĝiaj prioritatoj.

- EEU diskutos hodiaŭ kun Komisionano Andriukaitis pri projektaj proponoj por efike utiligi lian mandaton de (ĝis 2019).
- Kiel daŭrigojn de la konferenco en Nitro, ni organizis „Renkontiĝon de Poliglotoj“ en Universitato de Ekonomio en Bratislavo en 31/5 – 4/6/2017 (pli ol 400 partoprenantoj el 55 landoj), dum kiu okazos ankaŭ sekcio de lingva politiko.
- Urĝe bezonata estas subteno de la iniciatoj de Slovakio de aliaj EU landoj – por preparo kaj efektivigo de la rekomenditaj projektoj de la konferenco en Nitro.

Jozef Reinart

ZAMENHOF - LA HOMO DE EPOKOJ PRELEGO KADRE DE KONFERENCO DE EEU EN FREIBURG

Mi tralegis la libron de Aleksander Korĵenkov „La vivo, verkoj kaj ideoj de doktoro L.L. Zamenhof“. Ege interesa libro, kiu traktas Zamenhofon nur laŭ la dokumentoj kaj do, donas vere tre objektivan aliron al lia agado kaj evoluo. Min aparte interesis lia filozofia penso kaj volis informiĝi pri hilelismo/homaranismo kion mi ĝis nun ne esence konis. Kaj mi do atingis jenajn konkludojn.

Zamenhof antaŭ la 20-a jarcento ĉefe dediĉis sin al Esperanto kaj interna ideo. Li mem ne sciis difini ĝin. Lia difino fine de lia vivo tekstis en enkonduko al la Deklaracio pri homaranismo en 1913 „...dum la esenco de Esperanto estas politike kaj religie absolute indiferenta kaj la interna esperantista ideo prezentas nur nedifinitan fratecon, senton kaj esperon, kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ĝin...“

Pli malpli ekde 1900 li komencis intense okupiĝi pri io plia: ideologio kiu kondukus al lia baza celo, nome al kreo de socio kiu agados por unuiginta homaro. Tiu ideologio eliris el lia forta konvinko ke la bazo por humanismo estas starpunkto: „Agu al aliaj tiel kiel vi ŝatus ke aliaj agu al vi“, kion li atribuis al juda profeto Hilel. Pro tio li nomis sian konscian ideologian celaron la hilelismo. Tiu hilelismo evoluis de komenca ideo influu al judaro kaj helpi ilian problemon ĝis krei idean bazon por la komuneco kaj unueco de la homaro. Ĉar la hilelismon sufiĉe akre kontraŭstaris la esperantistoj, li ĝin iom pliĝeneraligis kaj nomis homaranismo. Esence oni povas diri ke li obsede ĝis sia vivofino volis krei movadon de homaranoj kiu celus unuecan homaron. Komence al tio ĉiam eslis ligita Esperanto: Homaranoj devus uzi neŭtrale homan lingvon en interpopola komunikado, kaj en la fina fazo, li tute ne plu menciis Esperanton. En sia juneco li starigis tezon ke la interpopolan (li ĉiam tion nomis „intergenta“) malamon kaŭzas manko de komuna lingvo kaj diverseco de religioj. Pro tio li longatempe ligis tion kune kaj batalis por Esperanto kaj serĉis solvon por unueca neŭtrala tuthomara religio. Lia homaranismo estis ĝuste tio: serĉo de homara neŭtrala religio kaj li ankaŭ daŭre parolis pri ties temploj.

Ambaŭ tiuj tezoj estas laŭ mi utopioj nerealismaj. La homara socia leĝaro enhavas la neprecon de mullingvismo kaj ne ekzistis homaro unulingva, nek ĝi estas ebla. Same pri religioj. Inkluzive de ateismo, kiu same estas religio kredanta ke klasika dio de religioj ne ekzistas, sed kredanta ke estas iuj naturaj fortoj.

Baze de tio oni povus konkludi ke li kreis ion kio estas malebla, kion cetere ankoraŭ nuntempe multaj neesperantistoj kredas. Tamen, ni bone scias ke sekvoj de lia agado kaj liaj ideoj estas tre realaj kaj signifaj en la mondo. La sekvo ne estas la lingvo mem, sed la ekzisto de la movado kiu similas al kiu ajn diaspora popolo. Li mem ne konsciis kaj pri tio fakte la esperantistoj ankaŭ nuntempe ne konscias ke tio kion li kreis estas perfekta ligo inter lingvo kaj ideologio. Tiu ligo ebligis ke nur Esperanto inter ĉiuj „artefaritaj“ lingvoj ekvivis. Li vane batalis por morte naskita monda religio, sed ne sciis ke li ĝin jam kreis samtempe kun la lingvo. La grandiozeco de lia laboro ne estis nur intuicia bonega praktika lingva kodo, sed la ideologio kiun li intuicie esprimis en siaj komencaj poemoj. Li neniam konsideris tion, kion li esprimis en siaj poemoj, ideologio sed pensis ke tio estas komenco de esperanta poezio. Legu la Esperon, Al la fratoj, Preĝo sub verda standardo, La vojo, Mia penso, Al la esperantisto... temas pri tre klaraj programpoemoj kaj kantoj. Ne hazarde esperantistoj kun entuziasmeo kantis la himnon kaj faras tion ankoraŭ nun kaj citis liajn poemojn ĉie kaj ĉiam. Tiel eblas klarigi ankaŭ la fenomenon de eternaj komencantoj. Esperantisto ne devas bonege koni la lingvon, sed li devas koni la sloganojn de liaj poemoj. Tiuj ideologiprogramaj tekstoj kreis la homgrupon kun komuna ideologio: la zamenhofa interna ideo, prezentita en deko da liaj poemoj. Lingvo estas lingvo nur tiam kiam ĝin uzas homgrupo ligita per komuna ideologio kaj kulturo. Pro tio ke ekde la komenco mem la lingvo estis ligita al socia programo (Ni riompos la murojn de miljaroj, kreos novan homaron...) Zamenhof ne konsciante kreis novan popolon kun celo kiu lin mem puŝis al insista kreado por forigi la malamojn intergentajn kaj kontribui al la monda paco. Li do ne konciis ke la ideologio, kiun li volis krei per siaj hilelismo/homaranismo jam ekzistis de la komenco: la interna ideo, difinita en la poemaro. Oni do povas konkludi: La grandioza atingo de Zamenhof estas popoloeto diaspora kiu per sia ideologio batalas kontraŭ malamo intergenta, preta je fordonado de sia lingvo al la mondo, kiam tiu estos preta akcepti ĝin. Li do ne kreis lingvon (tion faris miloj da aliaj ankaŭ) sed homgrupon kun specifa celo kaj neŭtrala, facile lernebla kaj lingvistike genia lingvo.

Tiu grupo trairis multajn sociajn krizojn kiel la daŭran batalon kun homoj kiuj ĝin kontraŭis, la problemojn de batalo por pluekzisto en ekstremistaj reĝimoj kaj la krizojn ene de la propraj vicoj, kiel la ido-skismo kaj pluraj problemoj pro lingvoreformistoj. Intertempe tiu socio kreis rimarkindan kulturon, pri kiu ĝi mem povas fieri kaj plukredi pri la propra valoro.

La popoloj kiuj havas fortan kredon pri sia propra valoro ne malaperas, eĉ se ili troviĝas sub la plej teruraj perfortoj. Tial E-popolo plu ekuistas kaj ekzistos ankoraŭ longe.

Zlatko Tišljarić

PRIFESTO DE 130 JAROJ DE ESPERANTO EN SLOVENIO



Slovenaj esperantistoj prifestis la 130-jariĝon de Esperanto, la 27-an de julio per solenaĵo en siaj ejoj en Ljubljana. Venis aro da ĵurnalistoj informiĝi pri tio kaj aperis pluraj artikoloj en blogoj de la ĉefĵurnalo Dnevnik kaj Televido Slovenio. Radio Slovenio ripetis la informon plurfoje dum la tago. Do, sendube la reagoj estis

pli ol pozitivaj. Dum la solenajho Janez Jug prelegis dulingve pri la unua lernolibro, Janez Zadavec parolis pri ebla lingva politiko kaj Peter Grbec parolis pri tre interesa instruado de Esperanto en elementa lernejo en Koper, kie infanoj libervole povas elekti instruadon de Esperanto per interreto. La infanoj uzas lerneajn tabulkomputiletojn por lerni E-on per duolingvo. Ili mem lernas kaj la instruisto nur respondas kiam ili havas demandojn. Tia instruado en kiu la infanoj estas aktivaj kaj kreantaj havas gravajn avantaĝojn. Ili mem poste lernas ankaŭ hejme kaj lernas multe pli ol en klasoj kie instruistoj instruas. Fine de la pasinta lernoĵaro el 19 enskribitaj infanoj 11 restis ĝis la kursofino.

Zlatko Tišljar

MI NE ESTAS ESPERANTISTO – INTERVJUO KUN DANIEL TAMMET

Mi ĵus rimarkis, ke la lasta libro *Ĉiu vorto estas birdo, kiun oni instruas kanti* de Daniel aperis antaŭ kelkaj semajnoj, fine de aŭgusto. Ne, mi ankoraŭ ne legis ĝin. Mi pretigis tiun ĉi intervjuon kun li retleterumante jam antaŭ jaro. Fine, mi tamen ne aperigis ĝin, ĉar tiutempe mi laboris tiom multe por TEJO, ke mi tute ne havis energion skribi pri aŭ en Esperanto krom mia laboro. Nun mi relegis nian korespondadon, kaj pensas, ke tamen indas paroli pri li, kaj lia interesa sinteno rilate al Esperanto. Ĝi eble tute ne plaĉos al vi. Se vi legos plu vi komprenos kial. La celo estas ekkoni pli kiel homoj ĝenerale pensas pri Esperanto, en kaj ekster la movado. Li klare staras ĉe la limo kaj rigardadas enen, sed neniam enpaŝas. La kontrasto estas enorma kompare al tio, pri kio mi laste skribis.

La intervjuo mem okazis *en Esperanto*, kaj la kialo estis, ke mi teorie aperas en tiu ĉi nova libro de li. Mi ne scias ĉu vere, aŭ kiel, sed li intervjuis min *unue* kun la intenco enmeti ankaŭ denaskulan perspektivon de Esperanto en tiu ĉi verkaĵo. Mi petis lin, ke kiel danko, li mem

respondu al kelkaj miaj demandoj. Malgraŭ tio, ke jam jaro pasis, mi decidis ŝanĝi nenion en miaj demandoj.



Daniel naskiĝis en Londono, en 1979. Li estas aŭtoro de pluraj libroj, eble la plej konata estas: *Naskiĝis dum blua tago* (2006). Li rakontas en ĝi pri sia vivo kun aŭtismo. Antaŭ la apero de la libro li iĝis mondfama pro sia kapablo rememori 22,514 ciferojn de la numero PI en 2004. La recitado daŭris pli ol 5 horojn! La eŭropa rekordo daŭre restas la lia. Do, estas evidente pri kiaj aferoj mi volis demandi lin. Pri tiuj aferoj, pri kiuj oni kutime ne demandas lin, do ĉefe pri Esperanto! Intervjui retletere estas malfacilege, kaj post tiu intervjuo mi decidis neniam plu fari tion. Oni ne povas redemandi, peti klarigojn kaj ĝenerale la konversacio tute ne fluas nature. Tio tre ĝenis min. Sed tamen, eĉ tiel eblis ekscii tre interesajn aferojn. Do, ni komencu!

Stela: Kial vi lernas lingvojn? Por kio vi uzas ilin?

Daniel: Mia gepatra lingvo estas la angla, sed mi neniam sentis ke la angla estis mia denaska lingvo – la angla ŝajnis al mi esti fremda lingvo, kaj mi esti fremdulo. Mi malkovris finfine la kialon kiam mi estis

25 jara kaj sciencistoj diris al mi ke mi estis aŭtisma (Asperger sindromo). Ĉar, kiel infano, mi sentis min malsama kaj stranga, mi havis pasion por lerni fremdajn lingvojn kaj klopodi komuniki kun aliuloj. Mi lernas lingvojn intuicie, sinestezie (en mia kapo, vortoj havas kolorojn, teksturojn, emociojn). Mi legas multe. Mi vivas en Francio, mia edzo estas franca, kaj parolas france ĉiutage. Mi uzas la islandan kun miaj islandaj amikoj. Mi estas verkisto, tiel kiam mi donas intervjuojn al ĵurnalistoj pri mia plej nova libro en Germanio, mi parolas germane; en Hispanio, mi klopodas respondi hispane al la demandoj de la intervjuisto, ktp.

Stela: Kial vi decidis lerni Esperanton?

Daniel: Mi Esperantiĝis kiam mi estis adoleskanto. Mi malkovris la ekziston de la lingvo en biblioteka libro kaj trovis la ideon tre interesa.

Stela: Evidente pleje interesas min via rilato al Esperanto. Vi diras, ke vi parolas la islandan kun viaj islandaj amikoj, kaj fakte vi parolas kelkajn lingvojn pro via laboro. Ĉu vi havas amikojn pro la lingvo Esperanto kun kiuj vi komunikas Esperante?

Daniel: Ne, mi ne havas Esperantistajn amikojn. Leginte bibliotekan libron pri la lingvo, mi nur daŭrigis legi kaj lerni sen ideo pri atingi ajnan celon aŭ renkonti Esperantistojn. Estis pure intelekta sperto.

Stela: Ĉu vi fakte jam iam ajn partoprenis Esperanto-renkontiĝon?

Daniel: Ne.

Stela: Kiu estas via plej kara libro por vi el tiuj, kiujn vi mem skribis?

Daniel: La plej kara de miaj libroj estas *Mishenka*, mia unua romano pri juna sovetia ŝaka grandmajstro kiu ludas intuicie. La romanon oni eldonis en Francio en la printempo 2016.

Stela: Ĉu vi legis libron de aliaj homoj kun aŭtismo, kiel ekzemple de Robison: *Rigardu en miaj okuloj k.s.* antaŭ aŭ post vi verkis vian libron?

Daniel: Ne, mi ne legis libron de Robison aŭ aliuloj kun aŭtismo.

Stela: Ĉu vi skribas aŭ parolas pri Esperanto en iu ajn de viaj libroj?

Daniel: Mi skribas ete pri Esperanto en mia dua libro *Embracing the Wide Sky* (france *Embrasser le Ciel Immense*), kaj estos ĉapitro pri la lingvo en mia plej nova libro pri lingvoj kiu estos eldonata en Usono, Britio kaj Francio en la sekva jaro en 2017. [temas pri la ĵus aperinta libro – Stela]

Stela: Ĉu vi jam rajtas al mi diri, kio estos la titolo kaj la temo de via plej nova libro?

Daniel: La titolon mi ne povas diri tamen – kutime estas la eldonisto kiu anoncos la titolon. La libro estos pri lingvoj – la franca, la angla, Esperanto, la Nahuatl, la signolingvo, ktp. [Nun ni jam konas la titolon: *Ĉiu vorto estas birdo, kiun oni instruas kanti* – Stela]

Stela: Kaj rilate ankoraŭ al Esperanto: vi diras, ke por vi estis/estas intelekta sperto, sed por multaj homoj ĝi estas ankaŭ socia. Do laŭ tiu strikte intelekta sperto kion vi dirus: al kiu vi proponas lerni Esperanton?

Daniel: Jes, por multaj homoj Esperanto estas socia. Sed por mi estas strikte intelekta sperto. Mi ne estas Esperantisto. Mi ne proponas la ideon de internacia lingvo. Mi admiras Zamenhof kaj mi trovas la lingvon interesa, sed nur sammaniere kiel mi trovas la francan, la germanan, la islandan, la signolingvon ktp. interesaj.

Stela: Do laŭ vi kio estas la difino de Esperantisto? Ĉu Esperantisto devas kredi je la ideo de Esperanto?

Daniel: Ne estas mia opinie unu difino de Esperantisto, sed mi pensas al uloj kiuj proponas la ideon de Esperanto kiel internacia lingvo. Por mi, interesas min la lingvo de Esperanto kaj ne la ideo.

Stela: Fine, venu la plej grava demando: ĉu vi kiel intelektulo pensas, ke komuna-internacia-dua lingvo simple ne bezonatas? Aŭ se bezonatas, tiam Esperanto simple ne funkcias/funkcios bone por tiu ĉi ideo?

Daniel: La komuna internacia lingvo hodiaŭ estas la angla. En la estinteco estis la franca aŭ la latina; en la estonteco estos eble la hispana. Uloj ĝenerale neniam elektas lingvon; ili lernas la lingvojn kiujn ili aŭdas hejme. Mia opinie ne estas afero de bona aŭ malbona ideo aŭ de “bezono”. La plejmulto de uloj “bezonas” nur lerni la gepatran lingvon kaj kelkajn vortojn de fremdaj lingvoj.

Stela: Dankon por via tempo, Daniel!

Do, kiel ĉiam, ekkoni novajn vidpunktojn, ideojn donas la emon pridiskuti kaj rediskuti la rolon de Esperanto. Ekkompreni kiel poliglotoj, homoj kun aŭtismo, homoj de ĉiu parto de la mondo pensas pri Esperanto kompare al aliaj lingvoj instruas al ni pli pri nia movado kaj tio ĉiam estas bona afero. Estas refreŝige kelkfoje legi tute alian pensmanieron. De iu, kiu fakte parolas Esperanton, do konas la lingvon, sed ne la movadon, kaj eĉ ne havas la intencon kontribui. Ne *tiel*. Tamen, li skribas pri ĝi. Do ja diskonigas pri Esperanto. Oni devas akcepti, ke por multaj homoj Esperanto estas lingvo. Punkto-fino. Ne pli. *Ne malpli*. Oni uzas ĝin pro intelekta intereso, oni bezonas ĝin por pasi ekzamenon, por ricevi diplomon kiel en mia hejmlando en Hungario. Ne por esti socia. Tiuj homoj supozeble neniam aliĝos al la movado. Ni povas denove rekonsideri kion signifas Esperantisto. Kion signifas la -ist-? Klara en ĉiu alia vorto, sed ne en tiu ĉi.

Mi, kiel denaskulo daŭre pensas pri tio, kion li diris. La plejmulto de homoj lernas sian gepatran lingvon, kaj tio sufiĉas. Li pravas. Por mi tio estis Esperanto. Lingvo kreita por aliaj celoj. Ĉu mi lernintus Esperanton sen miaj gepatroj? Ĉu mi trovintus la vojon al la movado sen naskiĝi en la mezo de ĝi? Ĉu interesintus min la tuta afero? Ĉu aliaj lingvoj interesintus min sen kreski kun du lingvoj? Sen renkonti internaciajn infanojn ekde tre juna aĝo? Demandoj, kiujn mi neniam povos respondi... Ĉu entute indas respondi? Ne. Pripensi? Jes! Dankon denove, Daniel.

Intervjuis Stela Besenyei

Foto: MelodyNelson18, CC BY-SA 4.0,

<https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=48811093>

LA 30-AN DE AŬGUSTO 2017 EN LA AĜO DE 93 JAROJ FORPISIS MARJORIE BOULTON (1924–2017)



Instruistino de la anglaj lingvo kaj literaturo en lernejoj ordinaraj kaj porinstruistaj, direktorino de porvirina pedagogia kolegio Charlotte Mason College en nord-okcidenta Anglio, doktoriĝinta en Oksfordo (1976) per disertacio pri la angla romanisto Charles Reade. Ŝi verkis angle poemaron, literaturologiajn librojn, tradukis kelkajn verkojn en la anglan, sed sian famon ŝi akiris kiel la plej granda poetino kaj dramverkistino en Esperanto.

Lerninte Esperanton en 1949, ŝi jam en 1951 verkis en ĝi sian unuan poemon (*Marborda ŝtono*), ekde 1952 ricevis 22 premiojn kaj laŭdajn menciojn en la Belartaj Konkursoj de UEA pro poemoj, prozaĵoj kaj teatraĵoj. Ŝia unua poemaro *Kontralte* aperis en 1955, sekvis pliaj poemaroj, dramlibroj kaj nefikciaj libroj, interalie, biografioj de Ludoviko Zamenhof (en Esperanto kaj angle) kaj Julio Baghy. Ŝiaj verkoj estas tradikitaj en la anglan, hungaran, italan, kroatan, japanan, litovan, polan, portugalan, rumanan,

slovenan, ukrainan kaj vjetnaman lingvojn. La Esperanta PEN-Centro kelkfoje proponis ŝin kiel kandidaton por la literatura Nobel-premio. Ŝia progresiga legolibro *Faktoj kaj fantazioj* (1984) estas unu el la plej multe venditaj libroj en la libroservo de UEA.

Marjorie Boulton estis membro de Akademio de Esperanto dum 50 jaroj ekde 1967 (la plej longtempa akademianeco inter la nunaj akademianoj). Dum pli ol 30 jaroj ŝi estis prezidanto de Rondo Kato / Esperantista Kat-Amikaro. Honora Membro de UEA (1985); laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen kaj FAME (1998), de la premio Degučić (2004) kaj de la premio de la Fondaĵo Grabowski (2014).

Ni funebras kaj kondolencas.

Halina Gorecka

Aleksander Korĵenkov

ESPERANTO KAJ LA POLA ROKMUZIKA WOODSTOCK-FESTIVALO 2017


De la 3-a ĝis la 5-a de aŭgusto 2017 jam la duan fojon okazis Multkultura Vilaĝo Esperanto, dum la Rokmuzika Festivalo Woodstock en Kostrzyn ĉe Odro, Pollando, ĉe la pola/germana landlimo. "Przystanek Woodstock" (Haltejo Woodstock) estas nomo de la pola rokmuzika festivalo, fondita en la jaro 1995, inspirita de la legenda samnoma muzika festivalo en Usono. Ĝia fondinto kaj la ĉefa organizanto estas la pola ĵurnalisto kaj aktivulo Jerzy Owskiak.



La projekton jam la duan fojon monsubtenis UEA kaj bonkoruloj, kiuj komprenis ĝian unikecon, direktitan al duonmiliono da gejunuloj, venintaj el multaj landoj: ideema, entuziasma, kiu jam 23-foje ĉeestis la senkoston rokmuzeikan festivalon, baptitan de ĝia organizanto Jurek Owskiak per la vortoj: Amo – Amikeco – Muziko. Multkultura vilaĝo Esperanto denove situas en la plej prestiĝa zono de la festivala tereno: sur la monteto de Akademio de Belegaj Artoj (ASP), kie estis sesdeko da institucioj/organizoj el la kampo de edukado, kulturo kaj arto.

Nia 20-persona teamo de mateno ĝis vespero laboris por informi kaj reklami pri Esperanto. La rikolto povas esti abunda, ĉar kursojn de Esperanto, gvidatajn de Stano Marček 3-foje tage, allogis grupojn de entuziasmoj, kiuj dum 2-horaj lecionoj ellernis po 6-7 lecionojn el lia lernolibro! Alia furajo estis prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado tra la mondo. La temo estis planita kiel kampanjo por Pasporta Servo, sed – ne venis permeso fari tion. Kamil, fervora vojaĝanto, kiu malgraŭ juna aĝo jam vizitis pli ol 70 landojn, allogis eĉ dufoje po tage interesigantojn pri vojaĝado „preskaŭ sen mono“. Nia informa agado ĉe la stando estis pliriĉigita per kolektado de subskriboj por paca Nobelpremio al la organizantoj de la festivalo. La rezulto estis pli ol dumil subskriboj! Gastojn en nian tendon invitis kantante JoMo kaj knabinoj el la grupo Esperanto-Familio. Valoran helpon donis reprezentanto de

TEJO Alessandro Bonfanti. Ili ambaŭ kun JoMo montris internaciecon de la lingvo, parolante kun la gastoj, interesigante ilin pri lernado de Esperanto.



Senlace laboris ĉe la stando ankaŭ nia plej maljuna teamano Kazimierz Krzyżak, iniciatinto de la projekto. Li ok jarojn korespondis kun la ĉefa organizanto Jerzy Owsiak kaj decembre 2015 li ricevis la proponon enkonduki Esperanton en la festivalon. Pro la iniciato de Kazimiro Krzyżak cetere sukcesis ankaŭ enskribo

de Esperanto kiel Nemateria Kultura Heredaĵo en Pollando sur la Liston de Naciaj Kulturheredaĵoj. Mi devas substreki rolon de la plej laboremaj viroj en nia tendumejo: Andreo Sochacki kaj Michał Sidorowicz. Ne mezurulebla estas valoro de la kontribuo de Stano Marček, kiu kunportis imponan informan kaj edukatan materialon kaj instruis po 6 horoj tage! Pri mastrumado okupiĝis Ata Kaczanowska, kun helpo de junuloj, zorgantaj pri aĉetado de manĝaĵoj kaj tagmanĝoj.



Tre riĉa estis la informa Esperanto-stando: 10-metrojn longa ŝildo informis pri Multkultura Vilaĝo Esperanto. Antaŭ la tendoj staris rulafiŝoj kun eldonaĵoj de Stano Marček, kun ilia ekspozicio apude sur grandaj tabloj. Tre interesis la publikon la fakto, ke la lernolibroj estis eldonitaj en kvardeko da lingvo.

La dua informa rulafiŝo invitis al la ĵus komenciĝinta kampanjo pri aplikado de Esperanto en telefonoj kaj

platkomputiloj Android, kiun preparis antaŭ la festivalo Piet Buijnsters, programisto de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Legu pli ĉe <http://www.iei.nl/ieieo77.htm>. La 4-lingva informa afiŝo estis la plej ofte fotografata objekto de la preterpasantoj.

Resumante la eventon – ĝi estis eĉ pli efika ol la pasintjara, vizitis nin pli granda kvanto de gastoj, nekredeble efikaj estis la Esperanto-kursoj, multaj homoj havis la eblecon informiĝi pri nia movado kaj ekkoni nian lingvon. Tre riĉaj estis la informaj materialoj, inter ili la plej ofte elektata broŝuro „Malkovru Esperanton”, pollingve. La ekspozicion pri „Zamenhof kaj lia kreaĵo” ni bone prezentis sur la muroj de nia tendumejo, kie okazis la ĉefa informado – ankaŭ pri Zamenhofa Jaro. Ni havis la honoron gastigi la doktoron Robert Biedroń,

prezidanton de la urbo Słupsk, la sola loko en Pollando, kie oficiale estis anoncita la Zamenhofa Jaro 2017. La Prezidanto estis gasto de Jurek Owsiak kaj intervjuita dum du horoj por centoj da miloj de la festivala partoprenantaro. R. Biedroń estas fama politikisto, malakceptata de la registaro pro tro liberecaj opinioj. Li estas sperta esperantisto. Nia Multkultura Vilaĝo Esperanto konsistis pasintjare el du grandaj kaj kvar malgrandaj tendoj. Ĉi-jare ni sukcesis aranĝi du aldonajn tendojn (senpage) – 3x3 m por nia „kuirejo” kaj 3x6 m por dormejo de knabinoj. Tio donis al ni pli da libera spaco por gastoj de nia „Vilaĝo”, kiuj abundis ĉi foje.



Pliaj fotoj videblas ĉe

https://www.facebook.com/andrzej.socki.5/media_set?set=a.1606101229435332.1073741929.100001064102501&type=3

kaj

<https://www.facebook.com/photo.php?fbid=1606109082767880&set=a.1606101229435332.1073741929.100001064102501&type=3&theater>

Halina Komnar

Fotoj: Andreo Sochacki

VLADIMIR PUTJIN MENCIIIS ESPERANTON!

Vladimir Putjin, prezidanto de Rusio – kiel neantaŭanoncita honorgasto – la 20-an de aŭgusto malfermis la ĉi-jaran sesion de la tradicia internacia ĵaz-festivalo "Koktebel Jazz Party" en Koktebel, artista vilaĝo en Krimeo, kie li diris i.a.: *"Muziko - ĝi estas lingvo, jen ĝi estas Esperanto, internacia lingvo, kiu unuigas homojn."*

En la festivalo "Koktebel Jazz Party" ekde 2003 partoprenis 150 konataj ĵaz-koletivoj de la mondo, ĉi jare alvenis 10 grupoj.

Elpaŝo de Putjin estis registrita kaj elsendita de pluraj rusiaj televidkanaloj, la registraĵo estas videbla ekzemple en la paĝo <https://ru.sputnik.kg/video/20170821/1034805478/putin-na-koktebel-jazz-party.html>

Szilvási László

AGADO DE UMEA

Jen kelkaj informoj pri agado de UMEA, eventuale ne jam konata al ĉiuj el vi:

Ni havas retpaĝaron kun informoj pri niaj projektoj: <http://umea.fontoj.net>

Ni uzas tvitero-konton por disvastigi medicinajn informojn el la tuta mondo, ofte tradukita en Esperanton el ekz. la angla: @UMEAeo.

La venonta Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (21a IMEK) okazos en Trier, Germanio, la 25-an ĝis 27-a de julio 2018.

La 26-an de oktobro fondiĝis apogita de la UMEA Ĉina Medicina Esperanto-Asocio, funkciante kiel Landa Asocio de la UMEA. ĈMEA intertempe jam aranĝis intertempe sukcesan Esperanto-prelegkonkurson en Bengbu, Anhui provinco.

Medicina Internacia Revuo (MIR) iĝis malfermalira antaŭ kelkaj jaroj. Ĉi tie vi povas alrigardi kaj elŝuti ĉiujn artikolojn: <http://interrev.com> (atentu: paĝo en la angla). MIR estas agnoskita kiel B-ĵurnalo laŭ la taksado de la Pola Ministerio pri Scienco kaj Alta Edukado kaj ricevis 8 poentojn. Tiel publikaĵoj en MIR estas taŭgaj por helpi la akademian karieron de polaj sciencistoj (disertacio). La ĵurnalo troviĝas en Index Copernicus kaj similaj katalogoj.

Pri la eldonstrategio de MIR:

La redaktaro celas science altnivelan ĵurnalon por plej efike montri la uzeblon de Esperanto al la scienca medicina mondo. Ĉar ne ekzistas sufiĉe da aktive esplorantaj medicinistaj samideanoj, antaŭ multaj jaroj la redaktaro decidis akcepti sufiĉe bonajn publikaĵojn en multaj lingvoj. Originalaj artikoloj tute en Esperanto estas kompreneble plej bonvenaj. Resumoj en Esperanto estas aldonitaj de la redaktaro. Ankaŭ anglaj resumoj estas devigaj. Pro tiu maniero ni ekzemple ricevis la agnoskon de la Pola ministerio - granda kaj grava paŝo. Plie Jagielona Universitato de Krakovo, unu el la plej malnovaj de la mondo, tial iĝis oficiala kuneldonisto, bone por la prestiĝo.

Apoganto el ekster nia rondo proponis enigon de MIR en la faman kaj prestiĝan sciencon registron-serĉilon „Scopus“ de la nederlanda Elsevier-eldonejo, kiu havas gravan influon al

sciencaj publikaĵoj. Rimarkinde estas, ke plenumigante interretajn enketilojn de Elsevier, oni facile trovas Esperanton inter la alklakeblaj lingvoj.

La anonima pritaksanto de Elsevier rifuzis akcepti MIR, ĉar...

„Ĝi estas publikigita en konfuza kaj nekomprenebla miksaĵo de lingvoj. Neniu, sed vere neniu uzas Esperanton, kaj la angla estas la akceptita kuna lingvo de scienca komunikado.”

En oficiala respondletero ni skribis, ke...

„La ‚nekomprenebla miksaĵo de lingvoj‘ certe estas nekomprenebla por ĉiuj, kiu kutime uzas kaj parolas nenion krom la angla. Proklami ke ‚neniu, sed vere neniu uzas Esperanton‘ konfirmas mankon de informo en la plej bona kazo, bedaŭrindan mankon de intelektuala modesteco en la plej malbona. Ekzistas racia pruvo, ke almenaŭ 2 milionoj da homoj, verŝajne eĉ pli, uzas kaj parolas Esperanton (<https://www.indecs.eu/2015/indecs2015-pp318-321.pdf>). Ekzistas ekz. ĉ. 1.315.944 Estlandanoj, sed neniu racia persono estus argumentanta, ke neniu uzas la Estlandan. Do la eldiro de via pritaksanto estas simple la senluziiganta esprimo de antaŭjuĝo.”

Christoph Klawe

JURNALA PAĜO TUTE EN ESPERANTO VEKIS HISPANOJN

Mi ne scias, ĉu tiu ĉi artikolo ja vekos la Hispanojn, eĉ se mi esperas tion, tamen mi kaptas la okazon por diri, ke estas ne la unua fojo, kiam mi konstatas, ke la Eo-movado en via lando bone viglas kaj aktivas. Kaj jen la rezulto.

Do, gratulon!
Germain Pirlot

Diario de Feruel
LA COLUMPIA
LA INVESTIDA DE LA LINGVA

“Por poeto Esperanto estas mirinda kampo kulturo-preta”
MIGUEL FERNÁNDEZ • ESPERANTO-VEKIGO KAJ TRADUKISTO

La granada verkisto dediĉis poemon al la geamantoj okaze de la Nacia Kongreso de Esperanto

Alia universalismo
En la lasta tempo, devas laŭ la lasta tempo, devas laŭ la lasta tempo, devas laŭ la lasta tempo...

“ Tradukisto de poezio devas esti poeto, ĉar li fakte verkas novan poemon ekvivalentan al originalo ”

Miguel Fernández, aŭtoro de la artikolo, en la Nacia Kongreso de Esperanto en Feruel.

Diario de Feruel - Membro de la Unuiĝinta Federacio de Esperanto - UNICEF

JAM KVINAN FOJON EN VROCLAVO ONI KANTIS ESPERANTAJN KANTOJN



La 20an kaj 21an de majo 2017 en Vroclavo okazis jam la 5a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. La ĉefa organizanto estis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, kiu ĉi-jare preparante la festivalon kunlaboris kun neesperantaj organizaĵoj Centrum Kultury Wrocław-Zachód, Klub Muzyki i kultury kaj Dolnośląskie Stowarzyszenie “Horyzont”.

Ĉijaran Festivalon patronis: Marŝalo de Malsupra Silezia Vojevodio Cezary Przybylski, Universala Esperanto-Asocio, EUROKKA, Pola Esperanto-Asocio, Mila van der Horst Kolińska, dr-o Ludoviko Zaleski-Zamenhof.

Laŭ la regularo en la festivalo partoprenis infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj. Ĉiu partoprenanto kantis du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estis nur Esperantaj kantoj. La Festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj: koruso aŭ ensemblo kaj solisto.

Sabate, la 20-an de majo okazis konkursa provaŭdo de partoprenantoj. Tiun festivalan parton gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon. Ĵurio, kies konsisto estis teamo de specialistoj – esperantistoj (Małgosia Komarnicka el Pollando kaj Stefan MacGill el Novzelando) kaj esperantistoj-muzikistoj (Jean-Marc Leclercq - la prezidanto de ĵurio, el Francio, Floréal Martorell el Francio, Carsten Schnathorst el Germanio) prijuĝis prezentadojn de la partoprenantoj. En la pritakso estis konsiderataj: lingvakorekteco, originaleco, inventemo kaj estetikaj valoroj.

Dimanĉe, la 21-an de majo okazis la Koncerto de la Premiitoj en la Centrum Kultury Wrocław-Zachód. La publikon kaj la partoprenantojn salutis la iniciatintino de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj - Małgosia Komarnicka, kiu ankaŭ mallonge prezentis regularon de la festivalo. Akompanis ŝin E-kantisto, posedanto Guinness-rekordon – JoMo, kiu kune kun Kaŝi fine de la Koncerto de la Premiitoj kantis kelkajn E-kantojn. La famaj E-kantistoj tiel dancige kantis, ke la publiko ĝuante belajn kantojn en Esperanto dancis sur la scenejo kaj apud ĝi.

La unuan premion en la kategorio „solisto” ĝis la aĝo 18 jaroj ricevis Oktawia Nowak, en la sama kategorio sed en la aĝo de 19 ĝis la 54 la unuan premion ricevis Wojciech Ławnikowicz kaj super la aĝo 55 jaroj la unuan premion ricevis Laurento Peuch. La unuan premion, sed en la kategorio „koruso aŭ ensemblo“ ĝis la aĝo 18 jaroj ricevis infankoruseto „Skoczne Nutki“ kaj super la aĝo 55 jaroj la unuan premion ricevis koruso „Okropy“.

La premiitoj ricevis diplomojn, pokalojn kaj, donacintajn de Halina Kuropatnicka-Salamon, volumetojn de poezio kaj de Stefan MacGill E-lernolibrojn kaj E-revuojn „Juna Amiko“. Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon pro la partopreno. Ĵurio aljuĝis ankaŭ unu premion pro akompanado, kiun ricevis Wojciech Ławnikowicz. La organizantoj ĝuste taksis ankaŭ penan laboron de tradukistoj kun kiuj de 5 jaroj kunlaboras. Distingitaj estis Halina Kuropatnicka-Salamon kaj Edward Edulo Wojtakowski.

Sumigante la 5 jarojn de malfacila laboro ĉe Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj oni devas substreki, ke nia celo por vigligi la kunlaboron kun neesperantaj medioj kaj disvastigi

Esperanton ĉiam estis atingita. Atestas tion kreskanta nombro da partoprenantoj, ankaŭ eksterlandanoj.

Ni jam invitas vin al Vroclavo en 2018 partopreni en la sekva la 6a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos la 19-20an de majo!

Małgosia Komarnicka

GERMANA POLITIKISTO JENS SPAHN KOLERAS PRO KRESKANTA UZO DE LA ANGLA EN GERMANIO



Potenciala posteulo de Angela Merkel, Jens Spahn, koleras pro la kreskanta uzo de la angla en Germanio: "Estas frenezaĵo, io, kiu neniam povus okazi al Francio!"

La elstara germana politikisto Jens Spahn, iuj mencias lin kiel ebla posteulo al Angela Merkel en la konservativa partio, akre kritikis la kreskantan uzon de la angla en Germanio, montrante, ke tia "frenezaĵo" neniam povus

okazi en aliaj landoj, ekz. en Francio. "Kunvivado en Germanio nur povas funkcii, se ĉiuj parolas germanan, inkluzive de ĉiu enmigrinto," li diris en konversacio por brita The Telegraph. Li rimarkas, ke lin aparte zorgigas ĉiam pli ofta uzo de la angla lingvo en Berlino. "Mi freneziĝas, kiam mi vidas, ke kelneroj en Berlino nur parolas la anglan," li diris en dua intervjuo, por Neue Osnabrücker Zeitung: "Vi neniam vidos tian frenezecon en Parizo," li diris. La angla estas instruata en germanaj lernejoj ekde frua aĝo kaj estas konsiderata grava scio.

El: Advance.hr

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de junio 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Jozef Reinbart, Stela Beszenyi, Halina Komar, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Szilvási László, Christoph Klawe, German Pirlot, Małgosia Komarnicka, advance.hr.

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

